

Ĉiuj grandpersonoj unue estis infanoj.
(Sed malmultaj el ili memoras pri tio.)
Antoine de SAINT-EXUPÉRY

BAZARO

Esperantlingva revuo, Kluĵo, Rumanio
Jaro V, Numero 1 (16)

2001, Printempo



ISSN 1453-7478

ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por rumanianoj estas 5.000 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por 'SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

Pruntlibraro de BAZARO

Ni posedas pli ol 300 librojn, dank' al donacintoj. Ĉiuj geesperantistoj el Rumanio havas eblecon prunti el la libroj SENPAGE! La petitan libron ni sendos per rembursito. Ni petas maksimume dum tri monatoj ellegi la pruntitan libron. Pro la perdita libro oni devas pagi 20.000 leojn.

Al la interesigantoj ni sendas la liston de la titoloj.

La red.

Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin:

Dr. JAKUBINYI György, ALBA IULIA, 550.000 leoj

ORADEA ESPERANTO-ASOCIO, 200.000 leoj

Nicoleta MENDREA, SLATINA, 100.000 leoj

Magdalena MIHAIOVICI, USONO, 30 USD

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

Oni rajtas aperigi artikolojn el BAZARO, sub la kondiĉo, ke oni aperigu ankaŭ la fonton.

BAZARO

Esperantlingva revuo

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ

RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111

RUMANIO

Eldonas:

MUNICIPAL KULTURDOMO

Piata Unirii n-ro 24, Kluĵo, RUMANIO

Redakcia komitato:

'SIGMOND Júlia, Liviu BARDI

BAZARO

Revistă în limba esperanto

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ

RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111

ROMANIA

Editatã de:

CASA MUNICIPALĂ DE CULTURĂ

Piata Unirii nr.24, Cluj-Napoca, ROMANIA

Comisia de redactie:

'SIGMOND Júlia, Liviu BARDI

Aperas: kvaronjare

Apare: trimestrial

PILGRIMADO SUR LA SANKTA TERO - 2000

Mi pensadas, ke pri la kaŭzoj kial oni elektis Tel Avivon kaj Israelon, kiel lokon de la 85-a UK, ni ne tre devas paroli. Krom la kutimaj principoj de UEA, laŭ kiuj funkcias iu „interkontinenta” ciklo de la kongresaj urboj kaj krom la fakto, ke Israelo estis elektita kiel kongresa „scenejo” jam antaŭ pli ol tridek jaroj, tute certe grave kontribuis al ĝia elekto la granda sankta jubileo de la kristanismo - la 2000 jara datreveno de la naskiĝo de Jesuo Kristo. La Sankta Seĝo, lia moŝto Johano Paŭlo la dua deklaris 2000 sanktan jaron, sed ne nur la katolikoj kaj ŝajnas, ke ne nur la kristanoj ekiris viziti la Sanktan Teron, pilgrimi sur la lokoj, kie Mesio vivis, agadis kaj suferis kaj mortis por ni. Ne estas troiga aserti, ke ĉi jare ĉiuj iras al Betlehemo kaj al Tiberiada lago, al Nazareto kaj Jerusalemo - kaj ne nur al Romo. El la plej malproksimaj anguloj de la terglobo kreduloj kaj ateistoj vojaĝas milojn da kilometroj laŭiri la Vojon de la Kruco, atingi la ŝtonegon, kiu kovris la tombon de Jesuo, aŭ admiri la belegan bazilikon, konstruita sur la lokon, kie Maria renkontis la arkanĝelon. Ni havis la bonŝancon partopreni la kongreson kaj poste viziti la ĉefajn sanktajn lokojn. Post nia enlanda reveno ŝajnas ke la pilgrimado iĝis pli grava parto de nia vojaĝo ol la UK mem. Esperante, ke pri la kongreso raportos aliaj partoprenantoj, kara Leganto, permesu al mi konigi kelkajn el niaj spertoj dum nia pilgrimado.

Dum nia veturado ni renkontis grupojn de pilgrimantoj el la plej diversaj landoj. Estis inter ili homoj el Meksikio kaj Pollando, el Hungario kaj Kolumbio, italoj, angloj kaj nederlandanoj ktp... Ni aŭdis parolante neolatinajn kaj slavajn lingvojn kaj aliajn, neniam aŭditajn de ni. Krom la pilgrimantoj el la bone konataj kristanaj landoj iomete surprizis nin grandaj grupoj el Ekstremoriento, Ŝrilanko ktp. Ni observis inter la grupoj monaĥojn kaj monaĥinojn el la plej variaj ordenoj, ĉiutagajn homojn, junulojn kaj malpli junajn personojn. Ili havis komunan trajton, ĉiuj alproksimiĝis al sanktaj lokoj kaj al religiaj relikvoj, al spuroj de nia Mesio kun profunda kredo kaj humileco. Same ili preĝis, meditis, kantis, partoprenis la sanktajn mesojn en diversaj lingvoj kaj komuniĝis. Observante, ke la grupoj estis gvidataj de sacerdotoj, monaĥoj, kiuj konigis la sanktajn lokojn, kune preĝis kun la kreduloj, iomete mi enviis ilin, ĉar kvankam ni bone dokumentiĝis

antaŭe kaj „lernis” nian vojon, ŝajnis al mi ke grupe, are estas pli bone plenigi la pilgriman programon. Ni partoprenis ital- kaj anglalingvajn mesojn. La homoj preĝis ĉiuj en sia lingvo, sed ni ĉiuj komprenis la vorton de la alia. Kortuŝa estis diri „Nia patro”-n reciproke kuntenante niajn manojn. Tiam ankoraŭfoje mi observis la unuiĝintan forton de la kredo, tiam ni sentis, ke ni ĉiuj ĉeestantoj estas gefratoj, animaj gefratoj.

Krom la sublimaj aspektoj de la pilgrimado, bedaŭrinde ni spertis ankaŭ malkonvenajn, maldignajn faktojn. Mi rimarkis kelkajn sanktejojn, kiuj ne estis sufiĉe prizorgitaj. Ekzemple en la Baziliko de la Sankta Tombo, kie en kelkaj lokoj ŝajnis al mi ke la diversaj eklezioj (estas ses kiuj havas partojn el la granda preĝejo) atendas unu la alian ke aranĝu, purigu la nezorgitajn partojn. Alie - sur la Vojo de Doloro, kiu trairas la araban bazon - la itinero mem estas sufiĉe malsilenta por meditante sekvi la lastan vojon de Jesuo kaj la stacioj de liaj suferoj ne estas ĉiam facile troveblaj. Bona estus se la ĉefaj kristanaj eklezioj aranĝus kune kaj markus uniforme tiujn haltejojn. Sed la menciitaj negativaj post kelkaj semajnoj post nia alveno hejmen, pli kaj pli paliĝas en nia memoro kaj iom post iom en nia koro, en nia animo kristaliĝas tiuj travivaĵoj, tiuj memoraĵoj, kies spertado forgesigas tutan lacecon kaj la kvazaŭ neelteneblan varmon, kion ni spertis. Estas neforgesebla la aspekto de tiuj (eble) miljaraj olivarboj - el la ĝardeno de la preĝejo Getsemane -, kiuj konservas la memoron de la lasta nokto de Jesuo antaŭ lia malliberigo, en Tabgha la loko kie Kristo multobligis du fiŝojn kaj kvin panojn, satigante kvin mil homojn. Same profundan impreson lasis en ni la preĝejo de la Anunĉiacio, la grotto kie vivis la familio de Jesuo. Ĉi tie inter la diversaj artaĵoj faritaj memore de la Sankta Patrino ni trovis ankaŭ mozaikon, kun E-lingva surskribo „LA SINJORINO DE LA ESPERO - PATRINO DE LA ESPERANTISTOJ”. Kaj ne estis malpli impona la baziliko de la Naskiĝo de Jesuo, konstruita super la grotto, kie Maria kaj Jozefo tranoktis dum ilia vojaĝo al Betlehemo. Aŭ la ruinoj, la restaĵoj de la domo de Sankta Petro en Kapernaumo. Estis nekredebla, ke ni iras sur la ŝtonoj de la vojoj, kiujn ankaŭ Li tuŝis, aŭ en konstruaĵoj, kie ankaŭ Li paŝis. Ekzemple en la iama sinagogo en Kapernaumo sendube ankaŭ Jesuo iris aŭ tra la samaj enirejoj, pordegoj eniris en la (nun malnova) Jerusalemo, tra kiuj ankaŭ nuntempe oni povas eniri. Fascinis nin la loko sur la Golgota, kie staris la kruco de Jesuo, kie Li suferis kaj mortis kaj glorie reviviĝis por savi niajn animojn.

Post la pilgrimo niaj animoj estis plenplenaj de dankemo, ke ni havis la bonŝancon, la dian donacon, ke ni povis viziti la plej sopiratajn sanktajn lokojn de ĉiu kristano. Antaŭ kelkaj jaroj same pleniĝinte kun la etoso de la ĉefurbo de la katolikismo kaj fortiĝinte en nia kredo, ni revenis el Romo, kien ni pilgrimis. Sed la ĉijara vizito estas tute alia. Se Romo estas „nur” la sidejo de la tera gubernatoro de Jesuo, la Sankta Tero estas la devenejo de la tuta kristanismo. Kaj en la vizitataj sanktaj lokoj ankaŭ nun post du jarmiloj regas Lia spirito, la spirito de la paco, de la reciproka amo kaj pardonemo, kiu espereble venkos iam en la tuta mondo. Estu tiel!

BUDAHÁZY István, ORADEA

LA 85-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 85-a UK okazis en Israelo, la lando de Jakobo, de Moseo kaj de Kristo, lando kies historion oni skribi(a)s per majuskloj. Preskaŭ ĉie videblas kvarmilan historion kunfandiĝanta kun la historioj el la Malnova kaj Nova Testamentoj.

Israelo estas malgranda lando, sed enhavas gravajn atestojn por la kompreno de la okcidenta civilizacio, kies komenco – vole ne vole – estis en tiu ĉi lando antaŭ kvar mil jaroj.

La kongresurbo Tel Avivo estas moderna, 90 jara sed, same kiel en la tuta lando, la moderneco kaj antikveco alternas: parto de la urbo estas la malnova havenurbo Jafo, 4000 jara. La ĉefa strato en Tel Avivo portas la nomon de d-ro ZAMENHOF, la kreinto de Esperanto, kiu estis judo.

La kongresejo estis parto de la dua etaĝo de moderna hotelo Dan Panorama, sur la mediteranea marbordo.

La kongresanoj ne estis multnombraj (1212 partoprenintoj el 61 landoj), sed en la vestiblo de la malgranda kongresejo ĉiam oni vidis kurantajn homojn el unu kunsido al alia, ĉar en la programo abundis ege interesaj kaj gravaj nomoj de Esperantujo.

La kongresa kuriero nomiĝis StelAvivo, ĉar dum unu semajno la Verda Stelo gastis en Tel Avivo. La karesnomo de la urbo estas „urbo sen pa^azo”, pro tio: „Stel Avivo senpa^aze”. Decidinte partopreni la Tel Avivan UK-n, mi ekkonsciis ke tiu ĉi kongreso estos aparta, iom ekzotika, ĉar la monda esperantistaro kongresos, unuafoje en Mezoriento, unuafoje en la Sankta Lando, kie anta^a 4000 jaroj vivis

Abrahamo kaj antaŭ 2000 - Jesuo Kristo”, kiel asertis Amri WANDEL, prezidanto de LKK, en sia varma invito „ne maltrafi unikan eblecon - viziti la Sanktan Landon, dum la Jubilea jaro 2000, en esperanta etoso kaj dum historia epoko, kiam la ŝtatoj kaj popoloj de la regiono provas komune konstrui pacan estontecon, epokfara paŝo kiu ankaŭ speguliĝas en la kongresa ĉeftemo: kulturo de paco”.

La kongresan temon enkondukis d-ro Boris KOLKER, kiu asertis ke ekzistas en la mondo aro da libroj, filmoj, operoj kaj baletoj pri milito, spite al la homa emo vivi en paco. Li „invitis” la esperantistojn, kiuj – laŭ ZAMENHOF – estas „pacaj batalantoj”, partopreni la internacian movadon por la kulturo de paco, toleremo, por solvi problemojn per pacaj rimedoj.

En la unua prelego pri la kongresa temo, d-ro Humphrey TONKIN starigis kelkajn demandojn por la konsidero de la publiko. Jen ili, diskutindaj kaj pritraktendaj ne nur dum UK, sed ankaŭ en lokaj E-kunvenoj:

1. Ĉu E estas aŭtentike alia ol aliaj lingvoj? Ĉu ĝi vere povas roli kiel lingvo de la paco?

2. Se jes, ĉu ni devas ŝanĝi la metodojn, kiujn ni uzas por utiligi kaj disvastigi E-n?

3. Kiujn konkretajn paŝojn ni povas fari por plifortigi la rolon de E kiel lingvo de la paco?

4. Kiun rolon ni povas ludi kiel privataj civitanoj en la lukto por la justa mondo kaj kreo de kulturo de paco?

5. Kiel mastrumi mondon de multaj kulturoj kaj multaj lingvoj?

La preleganto demandis sin kaj nin, kiel aspektus la mondo en kiu ne estus milito? La homoj evoluigus siajn familiajn kaj komunumajn rilatojn, regus la interkompreno kaj malaperus la perforto. Sed tio ne eblas sur la tuta terglobo! Kulturo de paco signifas akcepto de malsameco kaj nia komuna lingvo ofte transportas malsimilecojn por komprenigi ilin. En mondo sen diferencoj tian ponton ni ne bezonus. Ĉu bonega mondo? Diskutinda, ĉar mankus „la riveroj en kiuj la potenco de la kultura diverseco fluas, kaj per kiuj la floroj kaj arboj de tiuj kulturoj estas nutrataj”.

Prof. d-ro Christer KISELMAN prezentis la lingvan situacion en Svedio kaj Finnlando, ŝtatoj kiuj antaŭ 1809 estis unu regno kaj kie, iam, prilingvaj konsideroj ludis rolon en la solvo de konflikto.

Prof. d-ro Amri WANDEL, en la prelego „La du lingvoj de

Abrahamo: lingvaj aspektoj de kunekzisto”, prezentis la rolojn de la hebrea kaj araba lingvoj en Israelo en la kampoj de edukado, socio kaj tradicio. Li pritraktis la problemon el la vidpunkto de la judoj, kiuj elektas inter la araba kaj la franca en la lernejoj, sed ankaŭ el la vidpunkto de araboj, kiuj devas lerni la hebrean por havi karieron kaj laboron.

La preleganto konsideris kiamaniere la araba, minoritatlingvo, en la israela socio iĝas lingvo-kulturo de najbaroj.

Okazis la 53-a sesio de Internacia Kongresa Universitato, komuna (ekde 1995) kun kursoj AIS. Brile prelegis H. TONKIN pri „Shakespeare tutmonda”. Dum serio de kvar prelegoj la aŭskultantaro ekkonis „la atingojn de Shakespeare pere de la atingoj de liaj Esperantaj tradukistoj”, t.e. la verkojn de tiu gravega poeto kaj dramisto: Komedio de eraroj, La dresado de megero, Rikardo la Tria, Somermeznokta sonĝo, Kiel plaĉas al vi, Epifanio, Hamleto kaj Otelo kaj, fine, la kulmino: Reĝo Lear kaj La Tempesto. La prelegoj estis brilaj el enhavo- kaj lingvo-vidpunktoj, por kelkaj momentoj ni sentis spekti teatraĵon, „ondis” rido tra la salono, de tempo al tempo.

Pere de komputilo, lumbildoj kaj projekciilo, dum sesdek minutoj, prof. Amri WANDEL prezentis la plej koncizan historion de la Kreado. Li rimarkis ke la biblia rakonto de Genezo kongruas kun la modernaj teorioj pri la kreado de la universo kaj evoluo de vivo sur la tero kaj prezentis paralele la historion de Genezo, kiu laŭ la Biblio daŭris ses tagojn, kaj laŭ la scienco ses miliardojn da jaroj.

Kutime, la kongreslando prezentas sin al la gastoj, por ke ili eksciu kaj/aŭ kompreni la gastigantajn samideanojn, la kongresan urbon kaj landon, tiel ke ĉiu UK havas interkulturan rolon, perante sciojn pri la historio, geografio, kulturo, religio k.a. de la kongresa lando. Kaj la israelanoj havis kion prezenti al la gastoj: prelegojn pri Israelo, artajn aranĝojn kaj ekskursojn.

La organizantoj avertis nin ke la oficiala ripoztago en Israelo estas sabato kaj, pro la fakto ke laŭ la judismo, la tago komenciĝas ekde la antaŭa vesperiĝo, ĉiuj oficejoj, bankoj, vendejoj fermiĝas vendrede posttagmeze kaj refermiĝas nur dimanĉe matene (la unua tago de la semajno en Israelo). La aŭtobusaj kaj trajnaj servoj ĉesas vendrede posttagmeze kaj reekfunkcias sabate vespere. Tamen, en urboj kaj kvartaloj kun nejudaj loĝantaro estas esceptoj.

Alia loka moro estas la koŝereco. En plimulto de la israelaj

restoracioj kaj manĝejoj oni observas manĝaĵ-rilatajn jud-religiajn regulojn de t.n. koŝereco. Tio signifas ke tie ne eblas mendi pladojn entenantajn viandaĵojn kaj laktaĵojn kune. Tie ne haveblas ankaŭ porkaĵoj, nek marmanĝaĵoj. Semajnfine ĉiuj eksterhotelaj restoracioj estas nekoŝeraj. Pro la sabata ripoztago kaj la koŝereco, la 85-a UK komenciĝis marde kaj ne sabate, kiel kutime.

Ni eksciis ke la radikoj de la juda humuro troveblas en orienta Eŭropo je la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcento, ke ili ŝercas pri si mem, kaj ĉi tiu al si mem direktita humuro servas kiel defendo-mekanismo.

Poste Josef ŜEMER eksciigis nin ke Israelo estas „juda ŝtato”, kaj ebligas al ĉiu judo enmigri ĝin kaj akiri israelan ŝtatanecon. Dum la historio, la judoj konsideris sin ĉiam membroj de la juda popolo kaj ne francoj, rusoj aŭ araboj, laŭ la lando kie ili loĝis. Por fariĝi „oficiala” membro de la juda popolo, ĉiam sufiĉis (kaj nuntempe estas same) akcepti la judan religion. Tio estas unika fenomeno, kiu ligas religian apartenon al nacia identeco.

La Israela Nacia Vespero prezentis riĉan folkloran programon. Kun granda plezuro, ĝojo kaj profesie dancis la nacia folkloro trupo Anahnu Kan (Ni estas ĉi tie), kiu fondiĝis en Vilnius (Litovio) en 1948, kiel teatra trupo jidlingva (la jida lingvo iam parolata de milionoj da judoj en orienta Eŭropo, antaŭ la granda ekstermo de la juda gento dum la Dua Mondmilito, t.n. holokaŭsto). ZAMENHOF mem originis de la sama regiono (pola Litovio). La plimulto el la artistoj enmigris Israelon en 1971 kaj refondis la nunan grupon. Kun siaj rusa, litovia kaj jidlingva fonoj ili estis por nia kongreso kvazaŭ nostalgia omaĝo al la lando de ZAMENHOF kaj liaj gepatraj lingvo kaj kulturo.

Alian judan kutimon ni ekkonis pere de teatraĵo „La pototo” de Ŝalon ALEJHEM. La aŭtoro, la plej populara kaj la plej amata juda verkisto de la nuna tempo, estis samtempulo de ZAMENHOF (li naskiĝis en Ukrainio 1859 - mortis en 1916, en Novjorko). „La pototo” estas monologo de jento, hebreino kiu „petas juĝon” de la rabeno. La religio malpermesas al judoj miksi viandaĵojn kun laktaĵoj en sama manĝo. Se lakto trafas en porviandan ujon, oni devas „peti juĝon” de la rabeno ĉu la ujo estas *tref* aŭ ne. Se la rabeno juĝas la ujon *tref*, oni ne plu uzas ĝin. Tian „juĝon” venis peti la judino jento. Aktoris Vida Jerman, elstara dramaktorino el Zagrebo.

La komitato kunvenis plurfoje kaj diskutis i.a. la strategian

laborplanon de UEA 2001-2010, antaŭredaktita de komisiitoj pere de la reto. En la jaro 2000 la Tago de la Lernejo estas dediĉita al la projekto Interkulturo, iniciita de ILEI kaj UEA. Prof. Maŭro la TORRE prezentis la kvazaŭan lernejon „Tibor SEKELJ”, kies pli ol mil gelernantoj kunlaboras interkulture pere de la reto. Kelkaj instruistoj prezentis la laboron de siaj klasoj. Inter ili, la rumanoj Mihai TRIFOI kaj Aurora BUTE prezentis la rumanajn klasojn el Bicsad kaj Timisoara partoprenantajn la projekton.

Okazis la jam tradiciaj aranĝoj Ĉeh-kurso kaj seminario, ekzamena sesio de UEA/ILEI, kunveno de akademianoj, SAT, ILEI, juristoj, poŝtistoj, komercistoj, radioaŭskultantoj, blinduloj, ĵurnalistoj, medicinistoj, fervojistoj, kvizo, aŭkcio ktp.

Laŭ la kutimo, la urbestro de la kongresa urbo, ĉi jare Ron HULDAI, salutis la kongresanojn. Kep ENDERBY (prezidanto de UEA) donacis amason da libroj, eĉ vortaron, kiujn la urbestro danke akceptis kaj humure demandis ĉu okazos ekzameno venontjare. Amri WANDEL, nome de la LKK, dankis al urbestro pro la helpo al la kongreso kaj donacis al la urbestro ĉapon de la 85-a UK.

En la angulo de la Libroservo, aŭtoroj prezentis siajn verkojn. Vigle kaj interese prezentis sin i.a. jam fama verkisto Claude PIRON.

Indas rimarki la Internacian Infanan Kongreseton -IIK, okazinta en Hadassim, proksime de Tel Avivo. La infanoj antaŭvidas la estontecon de la movado.

Interesa evento estis la kreado, proksime de Jerusalemo, de la „Arbaro Esperanto”. Milo da arboj estas plantita: eblis ke kongresanoj aĉetu arbon kaj plantu li mem, meti sur ĝi propran nomon kaj havi ateston de la afero.

Revenante hejmen ni ordigis la eventojn, personecojn, vidindaĵojn, aranĝojn, prelegojn, ideojn, novaĵojn, kuriozaĵojn kaj konkludis ke ni ĝuis la kongreson, ĉar la granda familio esperantista montras la harmonian sintenon kiun revis la kreinto de Esperanto. Homoj de malsamaj kulturoj kaj lingvoj - unuigitaj de lingvo internacia: tia estas la sperto pri kiu revas ĉiu esperantisto. Neniam ni forgesos la dumkongresajn ekskursojn, okaze de kiuj ni admiris la varian naturon: maro, montaro kaj dezerto. Ni promenis sur la mediteranea marbordo, vidis la Lagon de Galileo, vizitis la fortikaĵon Masado en la dezerto, flosis en la Morta Maro (la plej malalta loko sur la terglobo). Ni ne maltrafis la okazon vidi kaj emocie viziti famajn sanktejojn de pluraj

religioj: la naskiĝloko kaj tombo de Jesuo Kristo, la Lamenta Muro, restaĵo de la juda templo, la orkupola Moskeo Omar (sankta loko por la Islamo) kaj la Bahaa templo en Hajfo. Ni sentis la brulan sunon sur nia haŭto, ni lavis nin per la onda blua maro, niaj okuloj vidis senfinan ĉielbluon, la blankon de la ŝtonaj domoj en Jerusalemo. Ĉiuj koloroj palas sub la brulanta suno, la okuloj „kaptis” nur helajn imagojn. Sed la menso pripensas la fore transmarajn pacnegocojn kaj... starigas demandon... al kiu ne trovas respondon.

Aurora BUTE, TIMISOARA
(laŭ ES-TO)

NIAJ VETERANOJ

Profunde inspiritaj de la versaĵo de S.SIMEONOV: „AL NIAJ VETERANOJ”, ni rememoris pri la niaj, dum la festa kunveno de Zamenhof-festo, okazinta en mezo de decembro 2000.

Nun mi provas prezenti ilin al la legantoj de BAZARO.

Dank’ al grandanimaj revemuloj, kiuj konservas dokumentojn, ni povas legi en „LUGOSCHER ZEITUNG” kaj „KRASSÓ-SZÖRÉNYI LAPOK” la 20-an de marto 1924, pri VINCZE Ödön, kiu aktivis en sia urbo, kiel komisiito de la Rumana Esperanto Centro. Eta fragmento de Esperantlingva presaĵo pruvas, ke: „Admirinde laboras en Arad s-ano Edmund VINCE. str. Mucius Scaevola 5. Li sukcesis organizi kursojn ĉe la Social-Demokrata Partio, Komerca Ĉambro, Liceul Industrial.” Pro ŝiriĝo de la paĝo, mankas la tuta informo, sed laŭ la Labor-Libro de nia sindona kuraĝulo, li estis neoficiala lingva instruisto. Laborante kiel oficisto en „Uzinele Resita” (1920-1926), li jam instruis la Internacian Lingvon. Poste en teksaĵfabriko „ITA” (1926-1928). Li aktivis eĉ tiam, kiam li ne havis deĵoron, dum la jaroj 1928-1951. En Oradea li laboris en diversaj metilernejoj, kiel sekretaro kaj en diversaj institucioj, kiel funkciulo. Primokojn dum la tuta vivo li suferis, sed firme li kredis kaj organizis kursojn en nia urbo. Li aktivis kaj kuraĝigis esperantistojn, kiuj aŭtodidakte lernis la lingvon. El inter ili, dank’ al Dio, ni havas du veteranojn: s-ano LENKEI Jozefo kaj s-ano SZÓKE Ernesto.

Kaj jen, kiel salutis s-ano SZÓKE Ernesto la 26-an de majo 1968, sian inspiranton VINCE Ödön:

JE VIA NASKIĜTAGO

Ĉiun bonon, longan vivon!	Pri nia amo helpema,
La plej veran bondeziron	Ni dezirus certigi vin
Transdonas al Vi nia kor'	En via kor' donacema,
Por via senlaca labor'!	Ni petas Vin konservu nin!

Malgraŭ la malfacilaĵoj,	Per Esperanta Unuiĝo,
Kiuj ĉeestas en ĉies vivo,	Kaj per insista kunlaboro,
Ni elkore ĝojas ke nun	Apud Vi ni stari volos!
Ni festas Vin en nia lingvo!	Pri Vi ĉiam ni rememoros!

Ni povas danki al s-ano LENKEI Jozefo, kiu konservis dokumentojn pri niaj bravaj, senlacaj apostoloj, tiel ni scias, kiam pasis en eternecon (1969.06.14.) kaj kie ripozas (Oradea, neologa tombejo) nia forpasinta veterano: VINCE Ödön.

La du vivantaj veteranoj aktivas eĉ nun. Malgraŭ la peza aĝo de 87 jaroj, s-ano LENKEI Jozefo aperigas artikolojn kaj tradukojn en la gazeteto „INTER NI” (kiun aperigas esperantistoj en Halifax, Kanado), kun la helpo de nia tiea amiko Stevens NORWELL. Tiel, en la nun finiĝinta Eminescu-jaro, oni povis ĝui pri la traduko de la „Unua letero” de Mihail EMINESCU. Dum la simpozio „Kulturo kaj scienco en Esperanto”, okazinta la 27-an de aprilo 1996 en Oradea, li partoprenis kaj deklamis versaĵon, kaj eĉ kantis. Nun li, pro malforto, ne plu povas eliri el la loĝejo, li informiĝas pri la mondo pere de vizitantoj kaj vigle interesiĝas pri nia revuo BAZARO.

Same modesta, niarava veterano estas s-ano SZÖKE Ernesto, poligloto, tradukisto kaj lingvo instruisto. La vortavara, okdek jaraĝa, grandanima revemulo, volonte rememoras al iamaj samideanoj el nia urbo, kiel: VANEA Dumitru, TANER Emil, KUPFERSTEIN Josif, NAGY Emeric, ORBAN Alexandru, CSEH Zoltán, GAL Antonio, GAL Ioachim, FRATER Iosif kaj SCHÖN Ernesto. En ilia tempo, dank' al klopodoj de Dumitru VANEA, en la urbo ekzistis du stratoj havante la nomojn: „L.L.ZAMENHOF” kaj „ESPERANTO”.

Kaj legu, kiel opinias poligloto, iĝante emerito, pri nia kara Internacia Lingvo, en sia poemo skribita la 3-an de aŭgusto 1991:

LA PLEJ BELA LINGVO

<p>1</p> <p>La plej bela, La plej kara lingvo, De l' homa kor' farita, Kiu estas aktuala, Eĉ ĉiam viva, Kiu neniam estos Morta - nek forgesita! Ĝi estas la lingvo De l' animo, De l' amo diktita, De l' Paco kaj Beno, De l' homa kompreno!</p> <p>3</p> <p>Granda manko De nia vivo Estas la kompreno Kaj la fido! La Homo la materion Devus superi, Kaj anstataŭ Malamo - Ĉiam sin venki!</p>	<p>2</p> <p>La homa lingvo Egale estas Veneno kaj kuracilo! Kion la parolo kovas?! Kiu scias - antaŭvidas?! Ĝi devas esti Por ĉiu nur kuracilo, Mirinda ilo! Do, la Lingvo de l' amo Estas la plej bela lingvo, Kiu ankaŭ mankas El nia homa vivo!!!</p> <p>4</p> <p>Se ni akceptus Niajn proksimulojn Kun amo, kompreno, Nia lingvo estus Neniam veneno! Plie ĝi estus Por ni vera ligo, Por ĉiuj - un' Beno!</p>
--	--

Jen tri el multaj esperantistoj-veteranoj, al kiuj, kun la vortoj trafaj de S. SIMEONOV: ni ŝuldas dankon el la tuta koro, kaj mi certe konsentas pri la alvoko: **IMITU ILIN ĈIUJ KUN FERVORO!**

MAKAY Attila, ORADEA

KUN LA KARAVANISTOJ

de Marcu BEZA (1882/85-1949)

– Nu, jen... Morgaŭ – dank' al Dio –, ni atingos la vilaĝon. Ĉi-nokte ni restos ĉi tie.

– Tre bone! – diris ni ĉiuj.

Ni sidis surtere kaj lasis la ĉevalojn paŝti sin. Tiu loko belas. Nokto serenas. En la larĝa kampo, ekdormema, freŝaj odoroj miksiĝis kun la lampiroj ekbruligantaj kandelojn enherbe. Neniam sentis mi tian

grandan ĝojon.

Kian vivon havas ĉi tiuj karavanistoj. Nur malbonon eltenas ili. Por ili alvenis malfacilaj jaroj. Kiel estis tiam, kiam veturadis tutaj karavanoj kaj ili hejmen revenis kun plenaj monuoj?...

Apud ni estis marĉo. Blanka gazo kvazaŭ ĝin kovris kaj manoj, nevideblaj buŝoj levis de temp' al tempo la gazon por ĝin kisi, por karesi ĝian vizaĝon. Kaj la akvo tremis, la mincaj (1) ondoj eligis ŝaŭmojn, kiuj karambolis kun flustroj mirindaj. La ĉielo, luno, steloj fore brilantaj, la longbranĉaj salikoj, ĉiuj videblis renversite ene de l' marĉo.

Ĥe! kiaj belaĵoj! Mond' alia tie, sube!

Ĉiam la marĉoj kaj la maro enpenetris kaj skuis min per ilia senfunda mistero. La karavanistoj estis parolantaj pri fantomoj, pri feinoj, kiuj belknabine sin ornamis, kiuj eliris ĉe la fontoj, kiam...

– Ssst..., silentu – mallaŭte diris oldul' (2) blankhara kaj blankvesta.

– Kio estas?

– Ĉu vi kovris la sonorilojn de l' ĉevaloj? – demandis la oldulo enpensiganta.

– Ni ilin kovris. Kial?

– Ho, Dio, granda estu cia nomo – kaj la oldulo dufoje krucosignis kaj balancis la kapon. Granda estas nomo cia!

– Kio estas, avĉjo?

– Nu, ĉu ne aŭdas vi? Ĉu vi ne scias, kie estas ni?... Nu, jen...

La oldulo klinis la orelon. Ni aŭskultas. Dum la nokto silenta, senmova, iuj estingantaj voĉoj sonorile elsonis el la marĉo. Ni eksentis grandan timon.

– Ĉu de sube aŭdiĝas? Kiel? Ĉu el la marĉo?

– Nenio, nenio – diris la oldulo.

Sed tiu bruo denove leviĝantis, alvenadis al ni; ĉi-foje kvazaŭ sonoritis ligna sonorilo.

– Ĉu vi aŭdas?... Grandas siaj signoj! Dio neniun lasas senpune.

– Ĉi tie – ekparolis la oldulo, – kie estas ĉi tiu marĉo, estis iam grandaj domoj, fama urbo, multehoma. Kaj popo (3) –fi al li –metis la okulojn sur sian propran filinon.

– Ĉu sur filinon sian...?

– Jes, jes... Li metis la okulojn sur sian propran filinon. Kaj ŝi, povra, komprenis, kaj tage kaj nokte preĝis ĉe la ikono de la Dipatrino pura ŝin savi. Iutage, dum granda festo, kiam la homoj kolektiĝis en la

kirko (4) kaj la knabino krucoŝignis, la popo rapidis kapti ŝin perforte. Kaj tiam la kirko, la tuta loĝloko sinkis kaj super ĝi eliris akvo, kaj la popo kaj la knabino ambaŭ fariĝis du fiŝoj, kiuj naĝis, naĝis, ne povante kapti unu la alian...

La oldulo silentis. Tiumomente la marĉo tremis.

„Naĝis, naĝis, ne povante kapti unu la alian!” flustris ni, timigite.

– Kaj restis la kirko; kaj la sonoriloj – feraj kaj lignaj – solaj sonoras dum la noktoj silentaj.

Ni kliniĝis ankoraŭfoje trans la marĝenon de la marĉo. Luno granda, kiel rado, pasis ene de ĝi, profunde, kaj steloj – lune ruĝis, kaj nuboj ŝaŭme ŝaŭmas... kaj al mi ŝajnis vidi domojn, kirkojn pordmalfermajn dum sonoriloj blasfemitaj sonoradis, sonoradis...

Glosaro: (1) minca = maldika, (2) oldulo maljunulo,

(3) popo = kristan-ortodoksa pastro, (4) kirko = kristana preĝejo

El la arumana anonime esperantigita laŭ Marcu BEZA: Cu chirăgiadzl'i, en la nacia Biblioteko de aromanoj, publikigita de Tache PAPAĤAGI.

KIAM MI ESTIS LA PLEJ MALFELIĈA EN MIA VIVO?

Jam en la pasinta jaro, en BAZARO aperis alvoko de s-ino ‘SIGMOND Júlia al la legantoj, nome ke ili skribu iliajn travivaĵojn, kiam ili estis la plej feliĉaj en la vivo. Multe mi pensis pri tio, sed mi konstatis, ke tion mi ne povas decidi, ĉar multfoje mi estis feliĉa, sed pleje neniam. Pasintjare en septembro mi forlasis mian urbon Kluĵo kaj mi translokiĝis al SZOMBATHELY (Hungario), kie mi trovis novan, pli konvenan laborlokon. Ĵus post la translokiĝo mi konstatis ion, kio instigas min nun skribi tiun artikolon kun tiu ĉi titolo.

Multfoje mi legis en E-revuo pri la fama profesorino el SZOMBATHELY, kiu sindonas al nia lingvo. Ŝi instruas E-n en la altlernejo, organizas kunvenojn ktp. Mi kredis, ke alveninte en ĉi tiun urbon, mi ĝuos veran E-etoson. Sed mi trompiĝis. De ses monatoj mi vivas en SZOMBATHELY, sed mi ne pro mia malpersistemo ne povis partopreni E-kunvenon. Multfoje mi telefonis al la antaŭmenciita profesorino, aŭ al la klubestro, sed ĉiam ili diris, ke post unu monato ili organizos ion. Monatoj pasis post monatoj kaj nenio okazis. Vane mi oferis mian helpon, ili ĝentile ne respondis je miaj ofertoj. Mi ne povas

imagi tion, ĉar se al Kluĵo venis esperantisto, ĵus ni organizis kunvenon, aŭ eĉ mi invitis lin al mia hejmo aŭ al kafejo. Ni ĝojis renkonti samideanon kaj babili kun li. Ĉu vere, en tiu urbo la esperantistoj transformiĝis? En ilia koro jam ne ardas la verda flamo. Ilin jam ne interesas la interna ideo de IL, nur la mono? Ĉi tie la plimulto ellernas E-n pro la fakto, ke ĝi estas facile kaj rapide ellernebla kaj akceptata la E-ekzamenon oficiale, ĝi estas tre utila por doktoriĝo, abiturientiĝo! Sed ne plu! Ĉi tie ĝi restas nur kiel senutila studobjekto! Kial? Ĉar sen movado, en kiu ni povas montri la utilecon de nia lingvo, kie oni povas uzi ĝin, neniuj komprenos, kial Esperanto gravas. Multfoje okazas kvereloj inter geesperantistoj. Kiel mi aŭdis ankaŭ en SZOMBATHELY. Sed kio okazas ĉi tie nun, estas tre-tre grava. Ĉu ĉi tie ni spektas la morton de nia lingvo?! Mi esperas, ke ne, sed pripensu tion kaj vekigu!

Mi tre malĝojas, ke ankaŭ en nia movado troviĝas multaj personoj, kiuj interesiĝas nur por iliaj famo aŭ mono. Se ili ne estis tiaj antaŭe, kial ili fariĝis tiaj? Ni ne forgesu, tiaspecaj homoj pli multe malutilas al E-movado ol ili utilas. Ni ne bezonas grandan kvanton de membroj, kiuj interesiĝas nur momente al Esperanto, ĉar post iom da tempo ili diros, ke E. estas stultaĵo, ankaŭ ili ek- aŭ ellernis ĝin, sed ili mem vidis senutilecon. Plie, veraj esperantistoj vidinte tiujn personojn, forlasos la movadon!

Bedaŭrinde, ne nur tiu sola kazo ekzistas en la mondo. Multfoje vi povos renkonti homojn, kiuj tute ne parolas Esperante, sed ili profitas de ĝi por partopreni E-kongresojn malmultekostajn aŭ akiri vizon. Poste ili kontraŭbatalos E-n, aŭ aliulojn, kiuj bone regas la lingvon, sed kiel profesiuloj ili uzas ĝin nur por profito, sed samtempe reklamante sin, kiel veraj „verdaj” esperantistoj.

Mi denove diros, ke mi estas tre malfeliĉa pro tio, sed mi esperas, ke post ne longa tempo la veraj esperantistoj en SZOMBATHELY vekigos kaj la „transformiĝintaj” revenos al la vera movado.

Fininte mian skribaĵon, mi esperas, ke venontfoje mi povos skribi en BAZARO pri la okazaĵo, kiu igis min plej feliĉa esti en mia vivo, nome, ke en SZOMBATHELY remalfermis sian pordon la E-klubo.

KOLOZSVÁRI Zsolt, HUNGARIO

DANKESPRIMO

La redakcio elkore dankas la novjarajn bondezirojn senditajn de la legantoj kaj deziras al ĉiuj belan printempon!

ĜUSTIGO

En la numero 2 (13) el 2000, en la titolo de la poemo Pablo NERUDA enŝteliĝis preseraro, anstataŭ „Kiel vi naskiĝis?” legu „Kie vi naskiĝis?”

En la sama numero enŝteliĝis du gramatikaj eraroj en la artikolo de SZŪCS Irene, sur la 10-a paĝo. Anstataŭ: „de kie ajn oni rigardas ĝin” legu: „de kiel ajn rigardas ĝin” kaj anstataŭ „kiu unuiĝas Eŭropon kaj Azion” legu: „kiu unuigas Eŭropon kaj Azion”.

Tre utila kaj interesa libro same por la Esperanto-parolantoj kiel por la rumanlingvaj lernantoj de ILo

ESPERANTO de Saul OSIAS

nun haveblas ĉe nia redakcio.

Sur la 242 paĝoj de tiu ĉi libro, inter interesaj opinioj pri nia lingvo ĝi entenas la Fundamenton de Esperanto, la Ekzercaron de ZAMENHOF kaj fundamentan vortaron Esperanta - Rumanan kaj Rumana - Esperantan.

Do vi ne perdu la okazon kaj rapide mendu ĝin remburse nur kontraŭ 25.000 leojn.

NEFORGESEBLA TRAVIVAĴO DUM LA 85-A UK

Por pagi malmulte por loĝado, mi akceptis loĝi en HOSTELO. Mi ne estas junulino, sed mi kredas, ke mi bone kunsentas kun gejunuloj, kial ne loĝi kune kun ili.

Alveninte hejmen post la interkona vespero, tamen ŝokis min la vindidaĵo en mia ĉambro. 5 junaj modernaj viroj, 2 maljunaj viroj kaj juna virino sidis sur kaj ĉirkaŭ mia lito. Ili paroladis. Enirante, fariĝis granda silento. Eĉ unu vorton mi ne povis diri. Granda Dio! Helpu min! Kien ekkuri? Kion fari? Mi rigardis al ili. Miaj ĉambroloĝantoj silente rigardis mian surprizitan vizaĝon kaj post unu minuto iu demandis min: „Kiel vi nomiĝas?” „Maria” – respondis mi ne tro afable. „Maria! Ni estas viaj fratoj!” Unue mi ne komprenis, sed li ripetis: „Maria! Ni estas viaj fratoj!” Eĉ hodiaŭ mi ne scias, kiamaniere ni povis loĝi kune,

neniam ĝenante unu la alian. Ĉiu vespero finiĝis en ĝojo, en parolado, en bela muziko, kun 2 esperantistoj el Francio, 5 el Brazilio, 2 el Germanio kaj 1 el Rumanio.

Kiam la brazilianoj adiaŭis, donis al mi librosignon kun teksto: PACON! NOVA ERAO!

Israelo restos por mi lando de miraklo kaj elkore mi diras: sen esperantistoj la mondo estus pli malriĉa, sen Kongresoj la esperantistoj estus pli malriĉaj!

LÁSZLÓ Mária, BAIÁ MARE

KORESPONDI DEZIRAS

S-ino Sabina COTIU (47 j.) pri Rozkruca spiritscienco (Rudolf STEINER)
RO-3400 CLUJ-NAPOCA, str. DONAT, Bl.XIII. sc.B. ap.26.
RUMANIO

S-ino Stela ICONAR (51 j.) inĝenierino pri la valortaksado de konstruado. RO-3400 CLUJ-NAPOCA, str. PARANG 6/35, RUMANIO

F-ino SIGMOND Rita (10 j.) kolektas bildkartojn pri eŭropaj ĉefurboj, reciprokas per bildkartoj aŭ poŝtmarkoj.
Ro-3400 CLUJ-NAPOCA, str. VIILOR 27/18, RUMANIO

NOVAĴOJ

TIMISOARA: Nacia E-Kongreso okazos en monato majo.

Interesiĝu ĉe s-ino Aurora BUTE, tel. 056/145-764

ORADEA: Ekumena Kunveno okazos la 26-an de majo 2001.

Interesiĝu ĉe s-ino LÁSZLÓ Mária, tel. 062/224774

CLUJ-NAPOCA: Nacia E-Renkontiĝo en septembro.

Interesiĝu ĉe s-ino 'SIGMOND Júlia, tel. 064/18196

ADRESARO

pri rumaniaj esperantistoj estas mendeblaj ĉe Redakcio de BAZARO.
Prezo: 15.000 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj.

A R A N Ĝ O J

15-a EKUMENA KONGRESO (54-a de IKUE kaj 51-a de KELI)
5-a JUNULARA EKUMENA ESPERANTO-TENDARO
14-21 julio 2001, Zagrebo, Kroatio

La aliĝkotizoj en eŭro por rumanianoj estas la jenaj:
Ĝis 31.03.2001: 10 eŭroj, ekde 01.04.2001: 20 eŭroj.

Kongres-kotizo aldone pagenda en la kongresejo:

Kun 2-5 lita ĉambro/1 persono: 150 eŭroj

Sen tranoktoj, kun tag- kaj vespermanĝoj: 80 eŭroj

Familioj 3-5 personaj en la sama ĉambro: 180 eŭroj

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.

Aliĝu al: Marija BELOŜEVIĈ, Sveti Duh 130,
HK-10000 ZAGREB, KROATIO

86-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
21-28 julio 2001, ZAGREBO, KROATIO

La aliĝkotizoj en eŭro por Rumanianoj estas la jenaj:

Aliĝkategorio	ĝis 31.12.2000	ĝis 31.03.2001	poste
individua membro de UEA	90	112	135
ne individua membro de UEA	112	140	168
kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	45	56	67
kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	67	84	102

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Senpage aliĝas: -infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 31.12.1980;
-nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

Aliĝu al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO

AKVARELO AL CLAUDIA MILLIAN

ION MINULESCU

(1891 - 1944)

En la urbo, kie pluvas dum semajno eĉ tri foje,
La loĝantoj sur trotuaroj
Venas-iras manenmane,
Kaj en urbo, kie pluvas dum semajno eĉ tri foje,
Kiuj venas, kiuj iras
En arbaro de l'ombreloj
Grincaj kaj malsekiĝintaj
Ŝajnas, kiel pupludetoj kun risortoj
Elvenintaj el la lud'montrofenestroj.
En la urbo, kie pluvas dum semajno eĉ tri foje,
Ne aŭdiĝas nur la paŝoj de pasantoj,
Kiel fore malaperas manenmane,
Ili al si kalkulante
Laŭ la ritmo de pluveroj defalantaj,
Kiuj gutas de la randoj de l'ombreloj
Kaj fluetas el ĉielo, el kanaloj,
Kvazaŭ verŝas
Kaj aspergas
La vivsukon
Senutilan
Distriĝeman
Kvietecan...

En la urbo, kie pluvas dum semajno eĉ tri foje,
Maljunul' - maljunulino –
Ludpupetoj difektitaj –
Lantiradas manenmane...

Tradukis 'SIGMOND Júlia

Antaŭ 120 jaroj naskiĝis Ion MINULESCU.

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO



IMPRIMATE-PRESAJO

al _____

PAPP TIBOR
TROMBITAS u.12.
H-4031 DEBRECEN
U N G A R I A